

FEBRUARO 2008

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2008:1

## Svenska Esperantokongressen i Göteborg

Sveda Esperanto-Kongreso en Gotenburgo



Foto: Göran Assner - Göteborg & Co

Sveda Esperanto-kongreso  
Gotenburgo 2008  
2 - 4 Majo

SEF  
ESE  
KELI  
SEJU  
ILEI-se



Gotenburgo estas la dua plej granda urbo de Svedio kun pli ol duona miliono da loĝantoj en la dense loĝata areo kaj preskaŭ 900 000 en Gotenburgo kun ĉirkaŭurboj. La urbo situas sur la okcidenta borde apud la elfluejo de la Gotia rivero. Gotenburgo estis fondita de la sveda reĝo Gustavo la 2-a Adolfo kaj ricevis siajn urbajn privilegiojn en 1621.

La urbo kunkreskis kun apudaj dense loĝataj areoj en la apudaj komunumoj Mölndal kaj Partille.

Kelkaj el la grandaj industriaj konzernoj kiel Volvo, SKF kaj aliaj bone konataj industriaj teknikaj kompanioj kiel ESAB kaj Hasselblad AB ekestis kaj havas siajn ĉefoficejojn en Gotenburgo. Granda parto de la svedaj eksporto kaj importoj iras tra la haveno de Gotenburgo, kiu estas la plej granda haveno de Nordio. Gotenburgo estas ĉefurbo de Okcidentgotia gubernio kaj episkopa sidejo de Gotenburga diocezo.

## LA ESPERO

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Februaro 2008 • 96-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

#### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Skaraborgs Offset, Skövde

**Prenumeration 2008:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sveda@esperanto.se](mailto:sveda@esperanto.se)

**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

#### Medlemsavgift 2008:

Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

**Postgiro:** 578-5 **Nätsida:** [www.algonet.se/~eldona/](http://www.algonet.se/~eldona/)

**E-post:** [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com) **Telefon:** 031 - 12 05 94.

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** [www.e-g.se](http://www.e-g.se) **E-post:** [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)

**Telefon:** 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54


**e-post:** [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Olof Pettersson



*Ĉu vi havas familion?*

Jes, mi havas gepatrojn kaj fratinojn.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

Mi ne certe memoras de kiam, kiu jaro, sed eble antaŭ dek jaroj... Mi ekonis Janko Luin kiam ni estis samlernanoj ĉe Reĝa Tehnika Altlernejo (KTH), kaj ĉar lingvoj interesis min ankaŭ tiam, li proponis ke mi provus esperantan komencantokurson ĉe EsperantoCentro. Mi provis, kaj... jam, mi estas.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Formale, mi havis neujn taskojn, mi nur helpis - kaj helpas - iom kelkfoje. Sed ĉi-jare mi asistas Leif Nordenstorm kiel redaktoro de *La Espero*, kaj mi kredeble kunlaboros kun SEF pri la aktivecoj por la lingvo-tago de Eŭropo, Europeiska språkdagen, en Septembro.

*Kiu estas via preferata libro en Esperanto?*

Bedaŭrinde, mi legis nur lernlibrojn en esperanto aŭ pri esperanto, ne literaturon. Mia unua libro, per kiu mi eklernis esperanton, estis "Jen nia mondo", sed mi plej ofte utiligas la vortaron, "Lilla esperantordboken". Mi tre ŝatas vortarojn.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis kaj ekkreskis en Tyresö, suda antaŭurbo de Stokholmo.

*Kie vi loĝas?*

Nun, post kelkaj jaroj, mi loĝas en Skarpnäck, Stokholmo.

*Pri kio vi laboras?*

Mi laboras kiel komputila teknikisto ĉe gimnazio, sed mi ankaŭ estas studento ĉe la universitato de Stokholmo, kie mi studas lingvistikon (kaj esperanton) kaj la svedan.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Mi tre ŝatas kanti! Mi estas membro de studenta horo dum dek jaroj. Lingvoj kaj lingvistiko tre interesas min, kaj ankaŭ komputiloj.

Estimataj samideanoj!

Mi neniam vidis naztukarbon. Floranta tia aperas sur la foto de Anita Dagmarsdotter.



Ĝin vi povos vidi se vi vizitos la Botanikan ĝardenon de Gotenburgo dum la ĉi-jara Sveda Esperanto-kongreso. Esperanto-kongreso estas ne nur

lingva afero. Kompreneble ni parolas Esperanton tie, sed ni ankaŭ turismas, ekhavas novajn amikojn, kaj - se eksterlande - ekkonas novan kulturon.

Se vi neniam estis en Esperanto-kongreso, ne hezitu, sed veturu tien!

Se vi jam estis, mi ne devas reklami, ĉar multaj el vi kiuj iam estis certe revenos.

Legu pri la kongreso en Gotenburgo kaj pri multaj aliaj kongresoj en tiu ĉi numero de *La Espero*.

Via redaktoro

# SEF:s kongress 2-4 maj 2008

## Vår i Göteborg

Kongress och vår och maj, allt på en gång!

Göteborgsklubben inbjuder tillsammans med SEF, SEJU, ESE, KELI och ILEI-se till kongress i början av maj. Och så dags är Våren på plats.

Den här gången startar vi med utflykt och möjlighet att under promenad och bussresa kontakta gamla bekanta eller knyta nya kontakter. Under utflykten besöker vi Esperantoplatsen, som kanske, kanske har fått sin slutliga utformning klar då. Vi besöker Botaniska trädgården – världsberömd med orsak – och kan beundra den stora magnolian i full blom intill entrén, de överdådiga tulpan-planteringarna, allium av många slag, liljor och blommande rhododendron bland mycket annat i trädgården och orkidéer i växthuset. Näsdruksträdet har nog något att visa. Men inte bara ögon och själ, utan även tunga och mage skall ha sitt. Fruktkorg och något att dricka finns med.

Kvällen bjuder på mat och samkväm med lite musik.

Kongressdagarna fyller vi tillsammans med innehåll: årsmöten, föreläsningar, diskussioner och samvaro i allmänhet. Och lite underhållning här och där. Ett preliminärt program presenteras separat på denna sida och kommer att presenteras fylligare senare.

Välkomna avbrott i arbetet blir måltider och fikapausar då Peter Bankholm – kocken från Malmö-kongressen – dukar upp.

Vårt 'kongressejo' finns i Masthug-

get, i det kvarter, där klubben har sin lokal i Sveriges största bostadsrättsförening, som klättrar upp längs Masthuggsberget, från torget några meter över vattennivån nästan upp till Masthuggskyrkan, en av stadens karaktärsbyggnader. Kongressejo ligger uppe på berget med cirka 300 m. till kyrkan - med utsikt över 'hela stan', en lagom promenad kanske? Allt boende är 'nere' och man tar sig upp på gator eller med buss, som stannar drygt 50 m från entrén eller på slingrande gångvägar, kanske delvis med hiss.

Ja, så är det det här med vädret: en skur då och då kan förekomma. Paraply ingår i standardutrustningen för göteborgare.

En viktig sak: Göteborg är en ganska populär turiststad och det är bra att vara ute i god tid med logibeställning.

En viktig sak till: att resa med SJ är billigt - om man är ute tidigt och köper sin biljett.

Kommer du någon dag tidigare är det inte fel: Liseberg är öppet och skärgården kan vara underbar så här års.

## Printempo en Gotenburgo

Kongreso kaj printempo kaj majoj, ĉio samtempel!

La gotenburga klubo invitas kune kun SEF, SEJU, KELI, ESE kaj ILEI-se al kongreso komence de majoj. Kaj tiam la Printempo jam ĉeestas.

Ĉifoje ni komencos per ekskurso kaj la ebleco dum promeno kaj busa vojaĝo renkonti malnovajn kaj trovi

novajn konatulojn. Dum la ekskurso ni vizitos Esperantoplatsen, kiu eble, eble ricevis sian finan desegnon. Ni vizitos la Botanikan ĝardenon – mondkonata pro certa kaŭzo, kaj povos admiri la grandan magnolion plene florantan ĉe la enirejo, la grandiozajn tulipojn kaj aliajn bulbplantojn de pluraj specoj, liliojn kaj florantaj rhododendrojn inter multajn aliajn kreskaĵojn en la ĝardeno kaj en la forcejo. La naztukarbo havos ion por montri. Tiom por okuloj kaj animo. Por la korpo ni kunprenos fruktojn, frandaĵojn kaj ion por trinki prome-nante, sidante sur benko aŭ razeno.

Vespere ion por manĝi, kunestado diskutante kaj kantante kun tirharmonika akompano. Kune ni plinigas la kongrestagojn per jarkunvenoj, prelegoj, diskutoj, kaj simpla kunestado. Jen kaj jen iom da distraĵo. Provizora programo aperas en tiu revuo kaj prezentiĝos pli detale poste.

Manĝoj kaj kafaŭzoj estos bonvenaj interrompoj por kiuj respondecas Peter Bankholm – konata kiel la kuiristo de la kongreso en Malmö.

Nia kongresejo situas en Masthugget, en la kvartalo kie troviĝas la gotenburga Esperanto-Centro. En la plej granda loĝkooperativo de Svedio, grimpante laŭ la deklivo de unu de la grandaj montoj en la urbo. De Masthuggstorget kelkajn metrojn super la akvonivelo, preskaŭ ĝis Masthuggskyrkan, la preĝejo kiu estas unu de la konstruaĵoj kiuj karakterizas la urbon.

La kongresejo troviĝas sur la monto, en Masthuggets Hus, ĉirkaŭ 300 metrojn de la preĝejo – de kie estas bela panoramo de "la tuta urbo". Eble konvena promeno? Loĝejoj – junulargastejoj kaj hoteloj, troviĝas sube. Supren oni iras laŭstratoj aŭ per buso kiu haltas ĉirkaŭ 50 metrojn de la enirejo, aŭ laŭ meandraj vojetoj, ŝtuparoj, eble parte per lifto. Pluvmantelo aŭ ombrelo estas partoj de la ekipoj de gotenburgano.

Grava afero: Gotenburgo estas sufiĉe populara vojaĝcelo kaj indas frue mendi loĝejon.

Dua grava afero: trajnvojaĝo malmultekostas, se oni frue mendas la bileton "Just-nu".

Alveno tagon antaŭ la kongreso indas: Liseberg estas malfermita kaj la arkipelago povas prezenti sin plej bela tiun tempon de la jaro, depende de la vetero.




Foto: Göran Assner - Göteborg & Co

# SVEDA ESPERANTO-KONGRESO

Sveda Esperanto-kongreso  
Gotenburgo 2008  
2 - 4 Majo

SEF  
ESE  
KELI  
SEJU  
ILEI-se



## Aliĝilo

Nomo: .....  
Adreso: .....  
Poŝtkodo: ..... Loko: .....

### Kongresa kotizo

Aliĝperiodo ĝis	A 15 marto	B 15 aprilo	C poste
1. Membro	280	350	400
2. Same, ne-membro	380	450	500
3. Juna membro, ĝis 25 jaroj	150	225	300
4. Same, ne-membro	200	275	350
5. Infanoj ĝis 15-jaraj senpage			

Unutaga bileto kostas duonon de la C-kotizo.

Valida kotizo ..... (kodo) ..... SEK

### Manĝokostoj

Tago		
A. Vendredo		
1. tagmanĝo	90	.....
B. Sabato		
1. kafo/teo	25	.....
2. lunĉo	70	.....
3. kafo/teo/fruktoj	25	.....
4. tagmanĝo	150	.....
C. Dimanĉo		
1. kafo/teo	25	.....
2. lunĉo	70	.....

Manĝokosto entute ..... SEK

Mi estas vegetarano/vegano (substreku la validan)

E. Ekskurso 190 kr (buso, enirbileto, fruktoj) ..... SEK

Mia sumo .....  
**SEK**

kiun mi pagis la ...-an de ..... 2008 al PlusGiro  
43612-1, Esperanto-Societo de Gotenburgo.

Sendu kopion de Adreso de la kongresejo:  
tiu ĉi aliĝilo al:  
Helfrid Karlsson Masthuggets Hus  
Gösta Andréas gata 1 Klingners plats  
423 36 TORSLANDA 413 18 GÖTEBORG

aŭ kiel aldonajon al  
helfrid.karlsson@telia.com

Aliĝo validas post pago.

## Logi

Vi har valt några alternativ som ligger bra till ur kommunikationssynpunkt. Göteborg får många turistande gäster, så vänta inte med beställning.

Från buss 60 till kongresejo tar det ca 1 min att gå.

## Hotell

**Hotell Opera** Norra Hamngatan 38 (vid Drottningtorget/Centralstationen), tel 031-80 50 80

1-bäddrum 2 nätter 1 900 kr (helgpris)

2-bäddrum 2 nätter 2 590 kr (helgpris)

Buss 60 från Brunnsparken, ca 1 min. gångväg, till Paradisgatan tar 14 min. Bussen går varje kvart. Alternativt finns spårvagn 3, 9 och 11 vid Brunnsparken, tar 8-10 min. till Masthuggstorget och knappt 10 min. gångväg i branta backar och trappor.

## Vandrarhem

**Stigbergsliden**, Stigbergsliden 10, tel 031-24 16 20 fd Sjömanshuset, K-märkt. Hållplats: Stigbergstorget, spårvagn 3, 9 och 11, 11-14 min. från Centralstationen, ca 1 min nerför backen. Gångtid till kongresejo ca 8 min i brant stigning med trappor. Kommuntalt ca 30 min.

**Masthuggsterrassen**, Masthuggsterrassen 10H, tel 031-42 48 20

Hållplats: Masthuggstorget, spårvagn 3, 9 och 11, 9-12 min från Centralstationen, ca 3 min (inkl. hiss) till

vandrarhemmet. Gångtid till kongresejo ca 6 min i brant stigning med trappor.

**Göteborgs Mini-hotell**, Tredje Långgatan 31, tel 031-24 10 23 Hållplats: Prinsgatan, spårvagn 1 från Centralstationen tar 11 min. buss 60 12 min. och ca 2 min. gångväg. Gångtid till kongresejo ca 10 min i brant stigning med hiss och trappor. Med buss 60 3 min.

**Hotell Linné**, Vegagatan 22, tel 031-12 10 60. Vid hållplats Vegagatan.

**Slottsskogen**, Vegagatan 21, tel 031-12 10 60. Hållplats: Vegagatan, buss 60 från Centralstationen till Vegagatan tar 15 min. Gångtid till busshållplatsen knappt 2 min.

Vi har reserverat ett litet antal sängar i Vandrarhemmet Slottsskogen

A. Bädd i 2-bäddrum 205 kr per person och natt del

B. Bädd i 3-bäddrum 180 kr per person och natt

C. Bädd i 5-bäddrum 160 kr per person och natt

Självhushållskök finns.

F. Frukost 55 kr,

S. Hyra av sänglinne och handduk 50 kr. Beställning kan göras till PlusGiro 43612-1, Esperanto-societo de Gotenborg. Betalningen måste finnas hos oss senast 31 mars. Plats kan inte garanteras. Först till kvarn.... Ring helst först till Helfrid Karlsson och boka, tel 031 - 56 05 88 eller 0739 63 47 36.

## Provizora programo

### Vendredo

13-17 Ekskurso al la botanika ĝardeno kun kafumado, poste komune al kongresejo.

18-19 Tagmanĝo

19-21 Geamika kunestado, kantado kaj tirharmonika muziko

### Sabato

9 - 10 KELI - kristanoj

9,30 - 10.30 SEJU - Gejunuloj

10 - 11 ESE - Eldona Societo

11-12 Prelego

12 - 13 Lunĉo

\*13.30 - 17 SEF\* Fiksita

19 - 22 Tagmanĝo kaj distraĵo

### Dimanĉo

9 - 9.45 Diservo

10 - 11 ILEI - Instruistoj

11 - 12 Prelego

12 - 13 Lunĉo

13 - 14 Komuna estrarkunveno

La plej aktualan version de la programo vi trovos ĉe: [www.esperanto-gbg.org/kongress.html](http://www.esperanto-gbg.org/kongress.html).

## Fonder

Svenska Esperantoörbundet förvaltar några fonder med huvudsaklig inriktning att utbilda i och informera om Esperanto.Utförligare information om dessa fonder har funnits i tidigare nummer av La Espero eller kan fås genom styrelsen. Ansökan om bidrag från dessa fonder ska tillställas styrelsen senast 31 mars alternativt 30 september.

## Folkrörelseforum

Regeringskansliets folkrörelseforum idag samlade omkring 200-250 deltagare från ett hundratal organisationer på Norra Latin i Stockholm. Omkring femton av organisationerna hade material med sig för bokbord, och några av bokborden var bemannade. Roland stod vid Esperanto-bordet, och pratade med ganska många som ställde frågor.

Integrations- och jämställdhetsminister Nyamko Sabuni höll ett kort tal, där hon förklarade hur regeringen ser på folkrörelserna. Hon sa att hon väntar sig att man ska göra överenskommelse om förhållandet mellan folkrörelserna och staten och om bidragsgivningen, och kanske sätta till en delegation för återkommande samråd.

Dagen var dessutom fylld av seminarier och paneldiskussion mm.

Ulla Luin

## Skolforum med 17500 besökare

Skolforum 2007, 29-31 oktober varade i tre dagar. Antalet besökare blev totalt 17500.

Helt klart är att en plats för esperanto på Skol-Forum fyller sin funktion. Det kommer besökare titt som tätt och frågar intresserat om språket. Vissa har haft släktingar som hållit på med esperanto.

Andra besökare är gymnasieelever som nu för första gången hör talas om esperanto och blir helt enkelt intresserade.

Att delta i Skol-Forum höjer utan tvekan medvetenheten om esperanto i Sverige. (Dessa synpunkter uttryckte Carl Mäsak efter att ha deltagit som informatör för första gången. Carl är vice ordförande i SEJU)

Lördag och söndag före mässan arrangerade Roland Lindblom, med hjälp av Roland Larsson utställningsytan, som omfattade 9 kvm.

Under måndagen får Roland hjälp av Carl Mäsak och Johan Krig Ölund. Johan kom direkt efter lång resa från Boden.

Tisdagen blev genast livligare när Lars Forsman kom för att i första hand hålla "minilektioner" med början varje hel timma. Deltagarna blev snabbt engagerade i lektionerna, som angavs till en kvart. De blev oftast lite längre genom deltagarnas frågor. En språklärare utropade vid slutet att "Det här borde alla få lära sig som ett andraspråk." Deltagarna fick efter lektionen med sig en Nyckel till esperanto, och brev 1 av SEF:s brevkurs, samt annat info-material. Lars har en smittande förmåga att engagera sina elever och väcka intresse på den korta tiden.

Andra besökare, som inte deltog i lektioner, stannade till för att få information och få med sig informationsbroschyren. Om intresset visade sig större, kunde de få brevkurs-brev och en esperanto-nyckel.

Onsdagen, sista dagen kom Carl igen (han var upptagen på universitetet under tisdagen). Johan var med och Lars fortsatte sina mini-lektioner. Stängningsdags klockan 16.00.

Roland får behövlig hjälp av Carl och Johan att plocka ned så mycket som fick plats i Rolands bil. Roland kör till Haninge och lastar ur. Sedan tillbaka att hämta resten som först får åka till Haninge, för att nästa dag transporteras till Esperanto-Centro.

Carl Mäsak och Roland Lindblom

## Årsmöte med institutet

Årsmöte med Svenska Esperanto-Institutet hölls i Göteborg den 6 oktober 2007.

Närvarande var representanter från medlemsorganisationerna: SLEA, ILEI-se, SEF, KELI samt den valda direktionen. Dock ingen representant för Esperanto-Gården, SEJU och Eldona Societo Esperanto.

Efter de sedvanliga årsmötespunkterna och beslut om direktionens ansvarsfrihet förrättades val för verksamhetsåret 2007.

Direktionen, som inom sig konstitueras, omvaldes i sin helhet: Lars Forsman, rektor, Birgitta Anevik, Inga Johansson, Ann-Louise Åkerlund, Folke Wedlin.

Institutet ställer sig positivt till inrättandet av en informationskoordinator. Direktionen ska ta fram statuter för donationsfonderna (Sam Janssons och Agda Zettermans fonder).

## Disko de Persone estas haveblaj

Du albumoj de la muzik-grupo Persone estas senkoste elŝuteblaj Ĉe la retejo "http://bertilow.com/persono/"

Ne-komerca kaj senprofita kopiado kaj disvastigado estas tute permesataj.

La albumo "En la spegulo" estas la dua albumo de Persone. Ĝi estis eldonita kiel kasedo en 1991. Tiam Persone jam konsistis el la nunaj tri membroj: Martin, Anders kaj Bertilo. Persone mem reeldonis la albumon kiel k-diskon, kun multe pli bona sono ol la origina kasedo.

La albumo "Povus esti simple" estas la tria albumo de Persone. Ĝi estis eldonita en 1996 kiel k-disko. Ĝi enhavas 13 pecojn inkluzive unu akustikan kanton: "Nun mallumas ekstere".

Kaj la albumo "En la spegulo" kaj "Povus esti simple" estas jam delonge elĉerpitaj, sed ambaŭ ili estas elŝuteblaj senkoste kiel torento (per programo kiel BitTorrent k.s.) La torento enhavas la tutan albumon kiel wav-dosierojn, tial la elŝutaĵo estas tre granda, sed kompanse la sonkvalito estas la sama kiel en la k-disko mem (= plena k-diska kvalito). Rimarku, ke la torento-elŝuto estas ankoraŭ iom eksperimenta. Estu do pacienca.

Kaj "En la spegulo", kaj "Povus esti simple" estas aŝkulteblaj ankaŭ ĉe Ipernyty.

La aliaj albumoj de Persone (62 minutoj, Sed estas ne, Sen) daŭre estas akireblaj Ĉe la eldonejo kaj muzika retvendejo "Vinilkosmo"



Floranta mangolio en la Botanika ĝardeno de Gotenburgo. Vidu ĝin dum la kongreso! Foto: Anita Dagsmarsdotter

## La Esperantisto de la Jaro 2007

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Elektitaj estis:

1998 William Auld  
1999 Kep Enderby  
2000 Hans Bakker; Mauro La Torre;  
Jouko Lindstedt  
2001 Osmo Buller  
2002 Michel Duc Goninaz  
2003 Dafydd ap Fergus  
2004 Helmar Frank  
2005 Povilas Jegorovas  
2006 Bertilo Wennergren

Ĉi-jare estis proponitaj 20 personoj, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn.

Germana esperantisto Peter Zilvar, prezidanto de Esperanto-Societo Sudharz, gvidanto de la Germana Esperanto-Centro en Herzberg estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2007 pro diversflanka agado por kaj per Esperanto en Herzberg – la Esperanto-urbo. Lia agado estis intensa ankaŭ en 2007: serio de altnivelaj seminarioj kaj ekzamen-sesioj, starigo de novaj ZEOj, imitinda loka informado pri Esperanto, evoluigo de kunlaboro inter Herzberg kaj Gora (Pollando) k.a.

Laŭ La Ondo de Esperanto

## Esperanto en Google

La nova decido de Google envicigas Esperanton inter nur 43 lingvojn, al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektiva serĉo. Tial la robotoj de Google nun traŭrante la reton aŭtomate rekonas retpaĝojn skribitajn en Esperanto kaj dum serĉado ebligas al la uzanto serĉi nur ene de ili. Saman pozicion kiel nun Esperanto ankoraŭ ne havas en Google tiom grandaj lingvoj kiel la hinda, la bengala, la latina, la afrikansa, aŭ la svahila. Cetere, Esperanto estas la sola artefarita lingvo tiel agnoskita.

Por serĉi per Google nur esperantlingvajn paĝojn, uzu la adreson:  
`http://www.google.com/webhp?hl=eo&lr=lang_eo`

Gravas en la adreso la teksto "&lr=lang\_eo" Ĉe la fino - tiu limigas la rezultojn al esperantlingvaj paĝoj.

Se vi aldonas ĝin finen de adreso de ajnaj serĉrezultoj en Google, tio montros nur tiujn rezultojn kiuj estas skribitaj en Esperanto.

Laŭ la provizataj informoj, ŝajnas ke Google nun kapablas serĉi ene de pli ol 2.680.000 esperantlingvaj paĝoj. Tio donas bonan bazon ankaŭ por utiligo de Google kiel granda korpuso de Esperanto.

## Lernu! kvinjarigis

La 22an de decembro la paĝaro "lernu!", plej granda kaj plej uzata reta kursejo de Esperanto, festis 5an datrevenon de sia lanĉigo.

## Ĉina vortarego post 14 jaroj

Post dek kvar jaroj da laboro aperis nova, ampleksa ĉin-esperanta vortaro. ĝin kompilis Wang Chongfang, 71-jara emerita mezlerneja instruisto el la urbo Zhenjiang en la provinco Jiangsu. La vortaro havas pli ol 1200 paĝojn kaj enhavas sume preskaŭ 100.000 artikolojn, do ĝi estas komparebla nur kun la plej grandaj nacilingvaj-esperantaj vortaroj. Pli granda ol ĝi eble estas nur la ĉi-jare aperinta nova, preskaŭ dumilpaĝa versio de la germana-esperanta vortaro de Erich Dieter Krause. Wang Chongfang, kiu jam pli frue estis konata de multaj esperantistoj interalie pro siaj tradukoj el ĉina klasika literaturo.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## 18 landoj vizitis Centran Oficejon

La 27-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 24-an de novembro, allogis 110 vizitantojn el 18 landoj. Por la dua fojo la prelegoj de la Malferma Tago okazis en la nova konferencejo de la UEA-domo, sed en la antaŭa fojo tie ankoraŭ mankis ŝovebla son-izo la muro inter la Ĉambroj Kanado kaj Aŭstralio, kiuj pli frue servis kiel ejo de Biblioteko Hector Hodler. Ĉi-foje ambaŭ ĉambroj estis kunigitaj en unu grandan salanon po du horojn komence kaj fine de la tago, sed dum tri horoj okazis en ili samtempe du paralelaj programoj. Komence la libroservisto Ionel Onet konatigis al la publiko la plej lastajn novaĵojn de la Esperanta merkato.

La ĉefa gasto de la Tago estis la

konata historiisto d-ro Ulrich Lins, kiu faris du prelegojn, "Esperanto kiel lingvo kaj ideo en orienta Azio" kaj "Mia alproksimiĝo al Zamenhof". La dua prelego ligiĝis al lia redakta laboro super la sesa eldono de la klasika verko "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat, kiun UEA lanĉis en la UK en Jokohamo. Alia historiisto, d-ro Ziko van Dijk, elpaŝis en sia ne malpli konata rolo de fakulo pri Esperanto-informado, prezentante sian plej fresŝan libron, "Informado praktike". Unu el la plej elstaraj nuntempaj Esperanto-verkistoj, Jorge Camacho, prezentis ne nur sian propran novan verkon, la poemaron "Eklipsas", sed ankaŭ la volumon "La lingvo serena" kun kolektitaj poemoj kaj eseoj de la Nobel-kandidato Baldur Ragnarsson, kaj la novan periodaĵon "Beletra Almanako", kies unua volumo ĵus aperis. Alispecan verkon, sian lernolibron "Esperanto per rekta metodo", prezentis Stano Marček, kiu lanĉis ĝian nederlandan eldonon en la Malferma Tago. Kvankam origine lanĉita antaŭ kelkaj jaroj, al multaj vizitantoj ankoraŭ nova estis ankaŭ la dvd-kurso "Esperanto - pasporto al la tuta mondo", kiun prezentis Lusi Harmon kaj Diana Babeck-Weichert. La vizitantoj povis konatiĝi ankaŭ kun ĝisnunaj kaj estontaj projektoj de E@I (Esperanto Ĉe Interreto), i.a. la planata reta informportalo pri Esperanto, kaj kun la agado kaj celoj de la eŭropa Esperanto-partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

La programon finis unuhora renkontiĝo kunestraranoj de UEA, dum kiu Ranieri Clerici, Claude Nourmont, Barbara Pietrzak kaj Loes Demmendaal respondis diversajn demandojn, i.a. pri la festado de la 100-jariĝo Internacia Jaro de Lingvoj, UK en Roterdamo, kaj eksteraj rilatoj de UEA.

Kun 12 ekzempleroj la reeldonita "Vivo de Zamenhof" estis la plej furora libro de la tago.

## La papo en Esperanto

En 2005 la nova papo Benedikto la 16-a interrompis la multjaran tradicion de sia antaŭulo Johano Paŭlo la 2-a, kaj post sia kristnaska parolado "Al la urbo kaj al la mondo" ("Urbi et Orbi") ne eldiris kristnaskajn salutojn en Esperanto. Ĉi-jare, samkiel en 2006, li denove salutis la aŭskultantojn ankaŭ en Esperanto.

## KALENDARO 2008

11 - 14. aprilo

Mezorianta esperantista renkontio en Amano, Jordanio.  
Inf: araba.komisiono@esperanto.org

18 - 20 aprilo

100-jara jubileo de Dana Esperanto-Asocio. En 2008 la dana esperantistaro festas la centjarigon de la Esperanta agado en Danio. La landa asocio organizas jubilean jar-kunvenon la 18an-20an de aprilo 2008 en ĉarma Kopenhago. La interesan kaj vastan programon kaj aliĝilon vi trovas ĉe: [www.esperanto.dk](http://www.esperanto.dk)

17 - 24. majo

60-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio en Poznano, Pollando. Inf: Dom Kultury "Kolejarz" al. Niepodleg\_o\_ci 8A, PL-61-875 Poznan, Pollando. Tel.: +48-601703231, fakso: +48-61-6331595, rete: pefa@op.pl

24 - 28. majo

Postkongreso de la 60-a Kongreso de IFEF en Malborl, Bialystok, Pollando. Inf: Dom Kultury "Kolejarz" al. Niepodleg\_o\_ci 8A, PL-61-875 Poznan, Pollando. Tel.: +48-601703231, fakso: +48-61-6331595, rete: pefa@op.pl

26 - 30. majo

Tutmonda kongreso de esperantistoj-jurnalistoj - en Vilnius, Litovio. Temo: "Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto". Inf: Litova Esperanto-Asocio, pk 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. - Telefono (portebila): +370-687-12219, fakso +370-37-228616, reto: litova.ea@mail.lt

29. majo - 1. junio

Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo (IMER) en Krajmorie, Bulgario. Temo: "Originala Esperanto-literaturo", lekcionoj, debatoj, distraj vesperoj, ekskursoj. Inf: Georgi Mihalkov, BG-1229 Sofio, ĵ. k. Nadejda V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario, tel: (02) 934-42-55, poŝtelefono: + 359 0889-137-555, rete: modest@abv.bg

15 junio

Internacia koncerto en Västerås.

En junio

Ordinare okazas Esperanto-kursoj en EsperantoGården, Lesjöfors.

23 - 27. junio

Esperanto-kursoj en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ĉiuj kursoniveletoj, kursanoj el la tuta mondo. Instruisto Atilio Orellana Rojas, kursogvidanto Tiina Oittinen. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltaasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, Finnlando. Rete: eafsekretario@esperanto.fi

15 - 18. julio

UK-Antaŭkongreso en Herzberg - Esperanto-urbo, Germanio

19 - 26. julio

93-a Universala Kongreso de Esperanto, UK-2008, en Rotterdam, Nederlando. Inf: UEA, Nieuwe Binnenweg 193, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044, rete: info@uea.org

19 - 26. julio

IJK, 39a Internacia Infana Kongreseto, en Oostvoorne apud Rotterdam, Nederlando. Inf: Bert SCHUMANN, 9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francujo. Rete: bertox@free.fr

23 - 30 aŭgusto

34-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète apud Montpellier suda Francio. Plurniveletoj kursoj, 100m de mediteranea plaĝo, ekskursoj, libroservo, ktp. Inf.: Esperanto Kulturo kaj Progreso, 10 impasse cole J.Ferry- FR-34290 Servian, Francio. tel/fakso: +33(0)4 67 39 16 30, rete jf.passarella@free.fr

El [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu) kaj el aliaj fontoj

## LINGVO

### Svedaj provincoj kaj gubernioj

Kelkaj geografiaj nomoj havas apartan Esperantan formon, aliaj ne. Ĉefurboj kaj aliaj grandaj urboj plej ofte havas alilingvajn formojn. Tial ekzemple Stokholmo nomiĝas Tukholma en la finna kaj Sutokuhoromo ejn la japana, kaj kompreneble Stokholmo en Esperanto.

#### Provincoj

La svedaj provincoj (*landskap*) jam de longe havas Esperantajn nomojn:

Lappland - Laponio (Laplando)  
Jämtland - Jemtlando  
Småland - Smolando  
Dalarna - Dalekarlio  
Norrbotten - Norda Botnio  
Värmland - Vermlando  
Ångermanland - Angermanio (?)  
Västergötland - Vestrogotio  
Västerbotten - Okcidenta Botnio  
Hälsingland - Helsinglando  
Uppland - Uplando  
Härjedalen - Herjedalio  
Östergötland - Ostrogotio  
Skåne - Skanio  
Södermanland - Sudermanio (Sudermanlando)  
Västmanland - Vestmanio  
Medelpad - Medelpado  
Halland - Halando  
Dalsland - Dalio  
Närke - Neriko  
Gästrikland - Gestrício  
Bohuslän - Bohuslando  
Gotland - Gotlando  
Blekinge - Blekingo  
Öland - Oelando (Elando)

#### Gubernioj

Ne ekzistas same klara tradicio pri la gubernioj (*län*). Redantante tiun ĉi numeron de La Espero pri la kongreso en Gotenburgo mi demandis kelkaj Gotenburanoj pri la nomo de ilia gubernio, sed ŝajnas ke ne ekzistas tradicio pri tradukado. Multaj esperantistoj uzas la nomojn de gubernioj en ilia sveda formo. Mi tamen faris liston kun proponoj:

Blekinge län - Blekinga gubernio  
Dalarnas län - Dalekarlio gubernio  
Gotlands län - Gotlanda gubernio  
Gävleborgs län - Gubernio de Gävleborg  
Hallands län - Halanda gubernio  
Jämtlands län - Jemtlanda gubernio  
Jönköpings län - Gubernio de Jönköping  
Kalmar län - Gubernio de Kalmar  
Kronobergs län - Gubernio de Kronoberg  
Norrbottens län - Gubernio de Norda Botnio

Skåne län - Skania gubernio  
Stockholms län - Stokholma gubernio  
Södermanlands län - Sudermania gubernio  
Uppsala län - Upsala gubernio  
Värmlands län - Vermlanda gubernio  
Västerbottens län - Okcidentbotnia gubernio  
Västernorrlands län - Angermania-Medelpada gubernio aŭ Gubernio de Västernorrland  
Västmanlands län - Vestmania gubernio  
Västra Götalands län - Okcidentgotia gubernio  
Örebro län - Gubernio de Örebro  
Östergötlands län - Ostrogotia gubernio

Tamen indas diskuti pri kelkaj nomoj. "Västernorrlands län" ja signifas ke ĝi situas en okcidenta Nordlando (Norrlando), kvankam ĝi ja situas oriente. Tamen kiam kreiĝis tiu gubernio Finnlando estis parto de Svedio kaj ĝi tial estis en la okcidenta parto de Nordlando. Ĉu tio influu la tradukon aŭ ne?

#### Urboj

La svedaj urboj Stokholmo kaj Gotenburgo tradicie havas apartajn esperantaj nomformojn, same kiel Helsingborgo. Malmö ne havas esperantan nomon laŭ mia scio. Eble ĉar la nomo estas malpli facile esperantigebla.

#### Ĉefpartoj

Kiel tradukiĝas la tri ĉefpartoj de Svedio. Ordbok svenska-Esperanto de Ebbe Vilborg diras: Gotio, Svealando kaj Norrlando. Mi persone ĉiam uzis la vorton "Nordlando", sed ekzistas argumentoj ankaŭ por "Norrlando". ze?

Mi invitas la legantojn de La Espero al diskuto pri geografiaj nomoj de svedaj gubernioj, urboj kaj ĉefpartoj. Se iu havas opiniojn ankaŭ pri la provincoj ankaŭ vi estas bonvenaj.

**Leif Nordenstorn**  
Redaktoro de La Espero

#### Kallelse till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet

Härmed kallas till årsmöte för Svenska Esperantoförbundet. Mötet kommer att äga rum den 03 maj kl 13.30 i samband med årskongressen i Göteborg. Sedvanliga förhandlingar enligt stadgarna. Motioner till årsmötet ska inkomma till styrelsen senast 28 februari.

## NOVA REVUO

Spegulo - soci-kultura revuo en Esperanto, aperos kvaronjare komence de la jaro 2008.

La unua numero de SPEGULO aperos meze de marto.

64-paĝaj kajeroj en formato A5, nigra-blankaj, kun kartona kovrilo, estas aboneblaj jam (kiel jarabono por ĉiuj kvar kajeroj).

Prezo por eksterlandanoj: 18 EŭR (+ 6 EŭR por eventuala prioritata ekspedado).

Abonojn akceptas: Wydawnictwo HEJME, PL 41-250 Czeladź, ul. Wska 21


mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644 BIC/SWIFT: BREX-PLPMBK

Loĝantoj de landoj de Eŭropa Unio pagas neniuajn bankajn pagojn!

Ekaboni SPEGULON por la jaro 2008 - kiu estu fruktodona por ni ĉiuj - volontigas VIN - redakcio el Pollando, Eŭropo kaj el Esperantujo.

## Amdeklaro al Sud-Afriko k. al naturo

*Jim' la migrulo. Aventuroj de juna leopardo. Siegfried Stampa. Tradukis R. Sachs. Prozo tradukita / romanoj. KAVA-PECH. Dobrichovice. 2007. 175 paĝoj.*



Hibride inter fakliteraturo kaj beletro troviĝas libro kiel "Jim' la migrulo", verkita kaj tradukita de du veterinaroj, ambaŭ germanoj, laborintaj en Sud-Afriko. La libro priskribigas kiel amdeklaro al leopardoj kaj al la Sudafrika loĝantaro. Bona priskibo! La leganto povas sekvi junan leopardon, kiu fuĝas antaŭ ĉasantaj homoj. Samtempe oni povas legi pri la sortoj de diversaj homoj en Sud-Afriko.

La libron mi rekomendas al ĉiu, kiu havas intereson pri bestoj kaj/aŭ pri Sud-Afriko. La lingvaĵo estas bona. La desegnaĵoj tamen estas malbonkvalitaj. La libro meritis pli bonajn ilustraĵojn.

Leif Nordenstorm

**Kallelse till årsstämma  
för Förlagsföreningen  
Esperantoupa**

Lördag 3 maj 2008, kl 10-11 i samband med Svenska Esperantokongressen i Göteborg.  
Styrelsenaŝ

Grupo de gemaljunuloj kunsidas en maljunulejo, babilante pri siaj ĝenaĵoj kaj doloroj.

- La brakoj estas tiom malfortaj ke mi apenaŭ povas levi ĉi tiun tason da kafo, - iu diris.

- Mi komprenas tion kion vi diras. Miaj kataraktoj estas tiom severaj ke mi eĉ ne povas vidi mian kafon, - aliu lo respondis.

- Mi ne povas turni la kapon pro la artrito en la kolo, - diris tria persono.

- Miaj kontraŭ-sangopremaj piloloj faras min kapturniĝema, - alia kunsidanto kontribuis.

- Mi supozas ke tio estas la pagendaĵo de nia maljuniĝo, - diris ekkuntiriĝa maljunulo.

Mallonga momento de silento okazis.

- Danke al Dio ke ni ĉiuj ankoraŭ povas veturigi, - gaje diris virino.

El Aŭstralio

Jozefina:

- Ĉu vi legis la novajn statistikojn?

Kruko:

- Ho, ne fidu statistikojn! Statistikisto estas persono kiu, se vi havas viajn piedojn en forno kaj vian kapon en fridujo, diros ke averaĝe vi fartas komforte!

El Francio

Kruko ĉiutage iras al preĝejo kaj petas la Sinjoron:

- Ho, Dio, permesu al mi almenaŭ unufoje gajni en la loterio!

Post 5 jaroj da vana preĝado la Sinjoro alparolas lin:

- Kruko, bonvolu finfine aĉetu almenaŭ unu loterian bileton!

El Hungario

Plenplena autobuso. Viro, al [tre] apude staranta virino, ĝuste sur lia piedo:

- Sinjorino, se vi puŝus moneron en mian buŝon, mi povus diri al vi ekzakte kiom vi pezas.

El Kanado

- Kiam mi intencas ebriiĝi, mi metas en mian poŝon slipeton, kie estas indikita mia poŝta adreso: Parizo, Elizeaj kampoj, 2; kaj en la sama slipeto mi skribas la frazon: "Bonvolu reporti min hejmen!"

- Sed vi ja loĝas en iu damna provinca urbaĉo de iu damna malriĉega lando!

- Vi pravas! Sed tamen dufoje oni ja portis min al Parizo!

El Rusio

- Kie do ni rendevuu, karulino? - demandas Kruko.

- Kie vi volas, miulo? - respondas Lia.

- Bone, kaj kiam?

- Kiam vi deziras, karuĉjo.

- Bone, karinjo - sed venu ĝustatempe!

El Francio

En kabaneton, kiu staras ĉe monto-malsupro, venas plorantaj geedzoj kaj diras al sidanta tie viro:

- Hieraŭ nia filo iris en la montaron skii, kaj ĝis nun ne revenis!

- Ne ploru. Kiel nomiĝas via filo? - diris la viro.

- Andrej Petrov!

La viro kapjesis kaj kriis:

- Google, venu al mi!

El la korto enkuras grandega hundo. La viro diras:

- Andrej Petrov, ĉu vi komprenis? Serĉu!

Post kelka tempo Google revenas kaj diras:

- Via peto ne donis rezultojn. Mi trovis 345235 Andrej-ojn kaj 245098 Petrov-ojn. Ĉu eble mi serĉu en la valo?

El Rusio

Anonco en tagurnalo: "Hieraŭ vespere s-ro Kruko de Bervalo ekbruligis alumeton por kontroli, ĉu li ankoraŭ havas benzinon en sia benzinujo. Benzino enestis. La enterigo okazos sabate je la 10a horo."

El Francio

- Sinjoro Ivanov, kial vi venis al la laborejo, ja hodiaŭ okazas entombigo de via bopatrino!

- Kara direktoro, laboro - unue, amuziĝoj - poste.

El Rusio

Oldulino iras laŭ la strato kaj vidas, ke tri viroj pugnobatas iun maldikan junulon. Ŝi krias:

- Kanajloj, kion vi faraĉas! Tri kontraŭ unu!

- Iru for, oldulino, - respondas la batantoj, - ni kaptis la spam-sendan-ton!

- Damne! Ne batu lin per pugnoj! Nur per piedoj - tiel estos pli efike!

El Rusio